TEJO-aktuale: numero 356, 2013-05-02

### Definitiva muzika programo de FESTO 2013 en Kelmis

La programo haveblas en la retejo de Vinilkosmo: http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/478151

### Verda Ŝtelo ankaŭ interrete

Ĝojiga novaĵo: la amata ludo Verda Ŝtelo jam ludeblas interrete ĉe http://gemelo.org. Ekde nun vi ne plu devos atendi ĝis la eblo vervive renkontiĝi por ludi per Verda Ŝtelo. Do, fiksu iun renkontiĝtempon kun viaj amikoj dise tra la tuta mondo kaj ĝuu la ŝteladon! Iru al http://gemelo.org!

### Ĵurnalismo en ĉefrolo dum la aprila Malferma Tago

60 vizitantoj el 12 landoj ĉeestis la 38-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 27-an de aprilo, antaŭtage de la 105-a datreveno de UEA. La ĉefpreleganto estis Kalle Kniivilä, profesia ĵurnalisto kaj redaktoro de la populara retgazeto Libera Folio, kies 10-a datreveno pasis nur kelkajn tagojn pli frue. Kalle Kniivilä faris du prelegojn, titolitajn en demanda formo: Kial ĵurnalistoj interesiĝu pri Esperanto? kaj, kvazaŭ spegule, Kial esperantistoj interesiĝu pri ĵurnalismo?
(Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 498, 2013-05-02) Legu pli:
http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=498#3

### Timothy Reagan elektiĝis kiel nova ĉefredaktoro de LPLP

La Estraro de UEA kaj la eldonejo John Benjamins lastatempe anoncis la elekton de prof. D-ro Timothy Reagan kiel la nova ĉefredaktoro de la revuo Language Problems and Language Planning (Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado). La revuo, kiun eldonas la konata lingvistika eldonejo John Benjamins (Amsterdamo/Filadelfio), estas la organo de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, la esplora fako de UEA.

D-ro Reagan estas internacie konata specialisto pri lingva politiko en edukado kaj pri fremdlingva edukado. Li ankaŭ verkis librojn pri komparaj neeŭropaj aliroj al klerigo. Li aparte interesiĝas pri gestolingvoj (pri kiuj li abunde verkis), pri sudafrikaj lingvoj kaj pri planlingvoj. Li scipovas Esperanton, ĉeestis kelkajn UK-ojn, kaj rolis kiel estrarano kaj nun konsilanto de la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 497, 2013-04-17) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=497#2

### Roland Schnell elektita kiel “Ambasadoro de Eŭropo”

Mi ricevis la informon de telc GmbH en Frankfurt, ke oni elektis min kiel "ambasadoro de Eŭropo" kaj invitas min al Frankfurt/Main inter la 1-a kaj 3-a de julio 2013.

Estas abunda programo, ekzemple vizito de la Centra Eŭropa Banko kaj interparoloj kun altrangaj gastoj.

Roland Schnell

### MULTAS LA KIALOJ POR ALIĜI AL LA ITALA KONGRESO ĈIJARE

Nun la tuta programo de la kongreso estas preta kaj vi povos trovi ĝin detale en http://kongreso.esperanto.it. En tiu programo estas amaso da kialoj por aliĝi.

Kaj jen novaĵo! Ankaŭ la programo de la belegaj ekskursoj estas preta. Bonvolu iri al la paĝo "ekskursoj" kaj admiri la interesajn lokojn, voj-planojn kaj belajn fotojn.

Cetere, se vi aliĝas ĝis la fino de majo vi ankoraŭ pagos la rabatitan kotizon de 40 eŭroj por eksterlandanoj kaj 80 por italoj.

Do, tuj aliĝu plenskribante la formularon en http://kongreso.esperanto.it aŭ sendante mesaĝon al laura.brazzabeni ĉe alice.it

por la lkk, laura brazzabeni

## GVIDLINIOJ POR TERMINOLOGIAJ POLITIKOJ DE UNESKO EN ESPERANTO

La internacia informejo por terminologio Infoterm, en kiu UEA membras ekde 2011, instigis la Komisionon pri Terminologiaj Instancoj de UEA al tradukado de la Unesko-dokumento “Gvidlinioj por terminologiaj politikoj”. La kelkdekpaĝa dokumento estas sistema referenco por ĉiu, kiu diverscele deziras projekti, plani kaj efektivigi terminologian politikon por subteni daŭrigeblan evoluigon de sia lingva komunumo.

Aliaj terminologiaj projektoj komenciĝos baldaŭ. Interesatoj pri terminologio povos viziti la budon Terminologio dum la Movada Foiro de la 98-a UK en Rejkjaviko.
(Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 498, 2013-05-02) Legu pli:
http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=498#2

## Blue floras la genciano, Möderbrugg, Steiermark, Aŭstrujo, 29.05. – 02.06.2013

Tute egale, ĉu vi estas Esperanto-specialistoj aŭ novuloj, tiu renkontiĝo estas por ĉiuj. Planata estas amuza semajnfino en la regiono Steiermark.

Nia restadloko estas en mondfama regiono. Ni decidas surloke pri la programo kaj la ekskursoj (nur tiu al Graz jam estas fiksa).

KOSTOJ por manĝo kaj tranoktado: 75,00 EUR

rabatita prezo por junuloj ĝis 27 jaroj: 40,00 EUR

Por partoprenantoj el jenaj landoj: Pollando, Hungarujo, Ĉeĥujo, Slovakujo:

junuloj ĝis 27 jaroj: 20,00 EUR

pli aĝaj el tiuj landoj 40,00 EUR

Enirbiletoj, kostoj por la trajno kaj aliaj ekskursoj estas krompagendaj.

Pliaj informoj kaj aliĝilo haveblas ĉe:

Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, 0049/7361/360615, 0049/170/4739318, Inge.Simon ĉe esperanto.de

## Peticio: Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio, nun!

Kial tio estas grava

Unu el la fondaj principoj de la Eŭropa Unio estas la egaleco de la lingvoj kaj de la kulturoj. Pro tio ke estas 23 lingvoj oficialaj, estas malfacile respekti tiun principon. Kaj la angla estas nuntage favorata kompare al la aliaj lingvoj. Ekzemple, la angla estas la sola laboro-lingvo de la Eŭropa Centra Banko. Havas malavantaĝon la eŭropanoj kiuj ne parolas la anglan.Elektu Esperanton, kiu estas lingvo neŭtrala kaj facile lernebla, kiel la lingvon de la EU, por egaligi la interrilaton inter la popoloj eŭropaj. Plue, havi tut-eŭrope la saman lingvon, tio permesus interdebatadon eŭropan en kiu ĉiuj nacioj povus kompreni unu la aliajn; tio do kreus Eŭropon pli demokratian. Aldone, laŭ la Raporto Grin, instigi la lernadon de Esperanto anstataŭ la lernadon de la angla, tio ŝparus ĉiujare 25 miliardojn da eŭroj, ĉar Esperanto estas inter kvin-foje kaj dek-foje pli facile lernebla ol la aliaj lingvoj.

Facebook: http://www.facebook.com/EsperantooficialalingvodeEuropaUnioNun

Ni, civitanoj de Eŭropo kaj de la mondo, ni vokas vin fari el Esperanto la 24an lingvon de Eŭropa Unio, por Eŭropo pli demokrata kaj pli justa rilate al ĉiu lingvo kaj kulturo de la kontinento. Elekti Esperanton estas plia paŝo en la eŭropa konstruado. Mankas debato je la eŭropa nivelo, Eŭropo ne devas esti nur ekonomia, ĝi devas esti ankaŭ Eŭropo de la popoloj.

### Venontaj renkontiĝoj

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), Raleigh, Nord-Karolino, Usono, 26an de junio ĝis la 5an de julio, Bv. kontakti Ellen M. Eddy, la administranton (EDDYELLEN ĉe aol.com), aŭ vizitu http://esperanto.org/nask/

Roskilde Festivalo 2013, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 8a de julio 2013, http://roskilde.festoklubo.dk/rf13

Migrado de Olivier Buisson en la Vogezoj, Francio, 1a ĝis 5a de julio 2013, Oliver Buisson (obuisson ĉe live.fr)

Esperanto-kastelo Greziljono, SOMERA programo, 6a de julio ĝis 17a de aŭgusto 2013, http://www.gresillon.org/somero

49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Utena, Litovio, la 6-an ĝis 14-an de Julio 2013, litova.ea ĉe mail.lt aŭ http://www.esperanto.lt

4a Ateliero de FEM, Kultura Centro Esperantista en La Chaŭ-de-Fonds, Svisio, 8a ĝis 13a de julio 2013, http://www.esperantio.net

46a ILEI-KONFERENCO, Herzberg am Harz (urboparto Sieber), Germanio, 12a ĝis 18a de julio 2013, http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de

Somera Esperanto-Studado (SES 2013), Martin, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio 2013, http://ses.ikso.net/

66-a Kongreso de IKUE, Kalwaria Zebrzydowska, Pollando, 13a ĝis la 20a de julio http://www.ikue.org/kong2013/

Nitobe-simpozio en Rejkjaviko, Islando, 18-20 julio 2013, Humphrey Tonkin (tonkin ĉe hartford.edu)

IEK2013, Saint-Amand-Montrond, Francio, 20a ĝis 26a de julio 2013, http://www.kava-pech.cz/iek

98a Universala Kongreso, Rejkjaviko, Islando, 20a ĝis 27a de julio, http://www.uea.org/kongresoj

86a SAT-Kongreso, Madrido, Hispanio, 28a de julio al 4a de aŭgusto http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

Internacia Junularo Semajno 2013, Tiszafüred, Hungario, 1a ĝis 8a de aŭgusto, http://www.ijs.hu/eo

Itala Kongreso, Kastelaro (Sanremo), Italio, 3a ĝis 10a de aŭgusto, http://kongreso.esperanto.it/80/?lang=eo

63-a Kongreso de KELI, Svitavy, Ĉeĥio, 3a ĝis 10a de aŭgusto, polnicky ĉe quick.cz aŭ cea.polnicky ĉe quick.cz aŭ http://keli.chez.com/Aligilo2013.pdf

Invito al 46-a Internacia Esperanto-Feriado en Szczawno, Pollando, 5a ĝis 15a de aŭgusto 2013, http://esperanto.wroclaw.pl/, Teresa Pomorska (pomer ĉe wp.pl aŭ pomer ĉe esperanto.wroclaw.pl)

FESTO, Kelmis, Amikejo, Belgio, 10a ĝis 17a de aŭgusto, http://alesk.eu/festo2013/

69a Internacia Junulara Kongreso, Nazareto, Israelo, 19a ĝis 26a de aŭgusto, http://www.tejo.org/ijk

23-a KISO en Marburg, Germanio, 19a ĝis la 25a de aŭgusto 2013, http://www.esperanto.de/KISO

Oranĝa renkontiĝo 2013, Hernusando, Svedio, 6a ĝis 15a de septembro 2013, http://www.seju.org/or2013 aŭ https://www.facebook.com/events/607583009256372/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu